

46-a Hispana Kongreso de Esperanto

De la 15-a ĝis la 20-a de Julio. 1986-a



KONGRESLIBRO


VIGO

La Espero

Himno esperantista

Movo de milita marŝo.

F. DE MÉNIL



- 1 En la mond-on ven - is nov-a
- 2 Sub la sankt-a sign-o de l'Es-
- 3 Sur neŭ-tral - a lingv-a fun-da-



sent - o, tra la mond-o ir - as fort-a vok - o; per flug-
per - o, ko-lect - iĝ - as pac-aj ba-tal - ant-oj. kaj ra-
ment - o, kom-pre-nant-e u - nu la a - li - an la po-



il - oj de fa-cil-a vent-o nun de lok - o flug-u ĝi al
pid-e kresk-as la a - fer-o per la - bor - o de la Es-per
pol-oj far - os en kon-sent-o u - nu grand-an rond-on fa - mi



lok - o Ne al glav-o sang-on so - i fant - a ĝi la
ant - oj. Fort - e star-as mur-oj de mil - jar - oj in - ter
li - an Ni - a di - li - gent - a ko-leg - ar - o en la



hom-an tir - as - fa - mi - li - on: Al la mond' e - tern - e - mi - lit -
la po-pol-oj di - vid - it - aj, Seddis - salt - os la obs - tin - aj
bor - o pac - a ne lac - iĝ - os, Ĝis la bel - a song - o de l'Hom -



ant - a Ĝi pro - mes - as Sankt - an har - mo - ni - on.
bar - oj per la Sankt - a Am - o dis - bat - it - aj.
ar - o por e.




ter - na ben' e - fek - tiv - iĝ - os.

0910

Juan Antonio Giménez
Pl. Pintor Segrelles, 1-B-19 *
46007 VALENCIA

46-a
Hispana Kongreso
de Esperanto

15-a - 20-a Julio 1986
VIGO
(Galegujo)



D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof (1859 – 1917)

HONORA COMITATO

Excmo. Sr. Presidente de la Xunta de Galicia.

D. GERARDO FERNANDEZ ALBOR

Excmo. Sr. Delegado del Gobierno en Galicia.

D. DOMINGO GARCIA SABELL

Excmo. Sr. Gobernador Civil de la Provincia de Pontevedra.

D. VIRGINIO FUENTES MARTINEZ

Excmo. Sr. Presidente de la Diputación Provincial de Pontevedra.

D. MARIANO RAJOY BREY

Excmo. Sr. Alcalde Presidente del Ayuntamiento de Vigo.

D. MANOEL SOTO FERREIRO

Excmo. Sr. Conselleiro de Educación de la Xunta de Galicia.

D. VICTOR MANUEL VAZQUEZ PORTOMEÑE

Excmo. Sr. Conselleiro de Cultura y Bienestar Social de la Xunta de Galicia

D. ALEXANDRINO FERNANDEZ BARREIRO

Ilmo. Sr. Director General de la Caja de Ahorros de Vigo.

D. JULIO FERNANDEZ GAYOSO

Ilmo. Sr. Presidente del Círculo Mercantil e Industrial de Vigo.

D. SEGUNDO FABREGAS VIZCONTI

ESTRARO DE HISPANA ESPERANTO - FEDERACIO

Honora Prezidanto. Miguel Sancho Izquierdo
Prezidanto. Salvador Aragay i Galbany
Vicprezidanto. Luis María Hernández Yzal
Sekretario. Víctor Ruiz Rodríguez
Vicsekretario. Josep Miranda Calvo.
Kasisto. Joan Font Civit.
Vôcdonantoj. María Rafaela Urueña Alvarez (Kastilio-Leono).
 Víctor Ortiz Gratal (Aragono).
 Francisco Zaragoza Ruiz (Valencio).
 Adonis González Meana (Asturio)
 Tomás Caspe Cereijo (Andaluzio).

Libroservo. Luis Hernández García
Financoj. Agustín Boix Bernat
Cêfredaktoro de la BULTENO. Giordano Moya Escayola
HEJS-JUNULARA SEKCIO. Miguel Angel Sancho
Fervojista Sekcio. Rafael Ruiz Criado
Eldona kaj Turisma Fakoj. Ines Gastón Burillo
Cêfdelegito de Universala Esperanto-Asocio en
Hispanio. Juan Azcuenaga Vierna
Oficejo en Madrido. A. Figuerola, G. Flores kaj
J. González Aboín.

FONDĀJO ESPERANTO

Prezidanto. Salvador Aragay i Galbany
Sekretariino. Ines Gastón Burillo
Administranto. Víctor Ortiz Gratal
Vôcdonantoj. María Pilar Sancho
 María Rafaela Urueña
 Adonis González Meana
 Tomás Caspe Cereijo


ORGANIZA KONGRESA KOMITATO

Prezidanto. S-ro Julio Bueno Cortes
Vicprezidanto. S-ro Pío Moa Banga
Sekretario. S-ro Jaime Canoa González
Vicsekretario. S-ro Manuel Lojo Martínez
Kasisto. S-ro Jose Carlos Quintas Montero

Vôcdonantoj. F-ino Pilar Montenegro Sanjurjo
S-ino Rosa Costas Bastero
S-ro Francisco Martínez Iglesias
F-ino Concha Pereira Lamelas
S-ro Alejandro Romasanta Rodríguez
S-ro Valentín Rodríguez Alvarez de Neira
S-ro Francisco Perez Parente

Kunlaborantoj. S-ro Xesús Alonso Montero
S-ro Antonio Alonso Núñez
S-ro Enrique Blanco Fernández

SALUTO AL LA GEKONGRESANOJ



Estimataj gesamideanoj.

Estas al mi granda plezuro, prezenti al vi miajn plej bonajn salutojn kaj bondezirojn.

Nun estas la dua fojo, ke viganaj esperantistoj havas la plezuron inviti la Hispanan Kongreson de Esperanto. La plej veteranoj el la esperantistaro gôje kaj ame memoras la antaŭan, kiel unu el la plej eukcesaj kongresoj. Ni asertas al vi, ke la ci jara kongreso estos ankau neforgesebla evento por ĉiuj el ni.

Kongreso havas tri flankojn. la laboran, la kulturan kaj la socian.

Nun kunsidos ne nur la estraro de HEF kaj la delegitoj de 45 E-asocioj, sed amaso da aliaj kunvenantoj. instruistoj, gejunuloj, religianoj, pacifistoj, verkistoj, eldonistoj, studentoj kaj aliaj fakuloj.


La kultura flanko estas bone atentata. per serio da prelegoj kaj per folkoraj festoj.

Kaj la socian flankon -vi devas mem sukcesigi- la L.K.K. kreas la programon, vi kongresanoj profitu de ĝi, per starigo de novaj amikecoj, per retrovo de la malnovaj.

La tuta HEF -estraro kore bonvenigas vin al Vigo.

SALVADOR ARAGAY
Prezidanto de HEF

SALUTO DE LA 46a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO



Oni diras, ke la Fido movas montojn. Tiel same la volo de la esperantistoj movas kongresojn. Per tio mi volas komenci tiun ĉi saluton ekde la galegiaj teroj. Mi diras volo, ĉar ĝi estas tio, kio movas la esperantistoj iniciati kaj alporti al la praktiko niajn principojn de homoj amantaj la pacon kaj la humanan kunvivadon, kaj samtempe, servi, kaj sukcesigi Esperanton, kio estas la deziro de ĉiu homo, alpreninta tiun idealon.

En la kongreso de Kartageno, kiel vi scias, mi fariĝis respondeca pri la organizado de tiu ĉi kongreso, kiun ni ĉiuj malvolvos en tiu rava urbo Vigo. Malgraŭ miaj jaroj, kiuj bone sumigitaj povas esti multaj, sed ne tiom same multaj en komparo kun mia volo, kiu levas min rilate Esperanton ĝis gradoj malfacile atingeblaj, kaj forgesigas la jarojn, kiujn mi povas adicii. Kiel dirita, mi fariĝis respondeca fidante la apogon de la vigaj esperantistoj, ĉiu el ili deziranta kunlabori kiel bona amanto de Esperanto, kiaj ili estas.

Pro tio, tie ni atendos vin kun malfermitaj brakoj por kunfandigi en fratecan ĉirkaŭbrakon, sub la signo de la Espero, ĉar Esperon signifas la esperantismo. La verda Galegio donacos ĉiujn siajn belaĵojn, inter ili la tri Malaltajn Enfluejojn, kiujn ni jam programis viziti. Ni atendas vin, jes, sed por la granda agado, kiun ni faras disvastigante tiun virtoplenan lingvon, tiel same virta el lingva kiel idealaj vidpunktoj.

Por mi persone estos sonĝo ripeti alian kongreson post la okazigo de tiu de la jaro 72, des pli, se tiun sonĝon mi realigos, spite la forpasadon de kelkaj jaroj, kaj memorante tiujn homojn, kiuj kune kun mi kunlaboris, jen ili estas.

s-ro Camilo Veiga Prego
s-ro Salvador Oliván
s-ro Emilio Crespo Cano

s-ro Lisardo Perez Perez
s-ro Jose García Sampedro.

Ĉiuj ili forpasintaj.

Tiel vi ja scias. Ni ciuj tie ĉi je via dispono atendante vin kaj dezirante la alvenon de tiu tago tiel feliĉa, por ke, kiel en ĉiuj kongresoj, ni sentu nin ĉiufoje pli esperantistoj kaj pli konsekuencaj kun la esperantismo.

La prezidanto
Julio Bueno



Antikva sidejo de Ŝparkaso.

VIGO

La urbo Vigo estas fama pro siaj enfluejoj (rias) ambaŭflanke ornamitaj de belaj pejzaĝoj. Ĝia loĝantaro rapide etendiĝis ĝis la monto Castro, hodiaŭ komplete ĉirkaŭita de grandnombraj rezidejoj.

Norde ŝirmita de la duoninsulo Morrazo, sude kaj oriente de la altaĵoj Madroa, Alba kaj Galiñeiro, kaj okcidente de la granita baro de la insuloj Cies, la urbo Vigo situas kvazaŭ enfermite en la belega kofro de sia enfluejo. Tiel la urbo estas ŝirmita kontraŭ la fortaj ventoj kutime blovantaj la apudmarajn urbojn. Krome, ĝi estas ankaŭ libera, danke al sia oceana klimato, de la ekstremaj temperaturoj kontinentaj. Vigo situas je 42° 14' 5" de norda latitudo, kaj je 4° 54' 49" de okcidenta latitudo je Madrido.

Vigo estas la eŭropa urbo, kiu plej rapidan kreskon demografian atingis en la lastaj cent jaroj. En 1840-a ĝi havis 5.520 loĝantojn, kiuj nuntempe atingas proksimume la nombron da 360.000. Tiun ĉi singularan fenomenon pravigas la naturaj fontoj de riĉeco en la distrikto, la grandiozece de la maro, kaj ankaŭ la obstina kaj entreprena karaktero de ĝiaj loĝantoj. Vigo estas la urbo plej moderna el Galegujo, kio tamen ne signifas, ke ĝi rezignas siajn tradiciaĵojn, kiujn cetere ĝi ame kulturas.

La ĉirkaŭaĵoj de la urbo prezentas ampleksan kampon, pro la denseco de ĝia kamparana kaj marista loĝantaro, por la festoj kaj tipaj pilgrimadoj, kiu, speciale en la dekstra bordo de la enfluejo, tre distingiĝas per sia rimarkinda interesa folkloro. La urbanoj de Vigo estas akceptema kaj afabia, eble ĉar Vigo scias sin senti eminente eŭropa.



Monumento al la fiskaptisto apud la fiŝa haveno.

REDONDELA

Ĝi troviĝas meze de malebena pejzaĝo, plena de arbaroj kaj valoj. La urbeton rigardas la pendantaj viaduktoj de la fervojo, kiuj krucas ĝian ĉielon ĉiudirekten. Kontraŭ ĝi kuŝas la insulo San Simón, proksima al la markolo de Rande.

La "Corpus" de Redondela daŭre konservas antikvajn kutimojn de vera intereso folkloro, tia estas la danco de la "penlas", en kiu infaninoj (= penlas) dancas, laŭ la muziko de sakfajlo kaj tamburino, sursŭltre de fortaj virinoj same dancantaj, kiujn teet oni nomas azeninoj. Ankaŭ estas fama la danco de la spadoj, de korporacia kaj marista karaktero, kaj havanta propran melodion. Lastloke, la "Coca" aŭ "Tarasca", monstra figuro en formo de serpento aŭ drako, intense plezurigas ĉiujn, kiuj ĉeestas la tiean procesion de la "Corpus".

PONTESAMPAIO

Ekde la urbo Cangas, tra la montaro prezidanta la duoninsulon Morrazo, kaj la trairejo plej mallarĝa de la enfluejo de Vigo, nomata markolo de Rande, oni venas al la vertico de la enfluejo. Tie, en Pontesampaio, okazis la batalo per kiu venko decidigis, favore al la hispanoj, la sorto de Galegujo en la Milito por la Sendependenco. Ekzistas granda ponto etendita super la enfluejo de la riveroj Oitaben kaj Verdugo, el kiuj originas la enfluejo de Vigo.

PONTEVEDRA

Kaj ni venas a la vertico unuiganta la du bordojn de la enfluejo. Tie, en la estuaro de la riveroj Lerez, Alba kaj Tomeces, riveroj misteraj kun verdaj akvoj milde fluantaj en kaŝitaj meandroj kovritaj de verdo, aperas urbo ordiganta sian domaron inter arbaroj, semitaj kampoj kaj herbejoj, kaj ŝirmita de la montoĉenoj de la duoninsuloj Salnes kaj Morrazo.

Pontevedra estas alia el la galegaj urboj forgesitaj de la maro. En ĝi estis aktiva haveno, al kiu iam daŭre albordigis diverstipaj ŝipoj komercacele venintaj el la maroj Balta, Kantabra, Norda kaj Mediteranea. Nun Pontevedra estas senigita je maro, kiel iuj aliaj urboj galegaj. Ĝi preskaŭ estas urbo interna, maksimume apudrivera. Pontevedra estas unu el la plej ĝentilaj kaj spiritaj urboj el Hispanujo. La provincara vivmaniero hispana povus multe lerni el Pontevedra.

VILLAGARCIA DE AROUSA

En Carril kaj Vilagarcía, la enfluejo de Arousa -pli bone ni nomus ĝin la maro de Arousa- komencas disradii la unuajn fascinojn de beleco. Fronte al ĝi aperas la insulo Arousa, hodiaŭ ligita per ponto kun la tero. En tiu insulo iam nestis korsanoj kaj kontrabandistoj. Hodiaŭ, kun siaj belaj fasadoj kalke blankigitaj, kun siaj industrioj de peklaĵoj kaj konservaĵoj, kun siaj tavernoj kaj fiŝkaptistaj brakoj, ĝi konsistigas bildon de intensa kaj agrabla gusto. De la monteto oni ekvidas panoramon de senfina beleco.

Vilagarcía fakte estas la industria kaj komerca kapurbo de tiuj ĉirkaŭaĵoj, kun grava centro de komerco de ligno kaj de produktoj por la fiskapta industrio. Tie ankaŭ ekzistas trampo-navigado kun granda nombro da konsignaj entreprenoj.

CAMBADOS

Tre proksima al Vilagarcía troviĝas la plej grava koncentrejo de antikvaj kaj nobelaj palacoj. La kajo de Cambados estas ĉiutaga atestanto de la plej belaj kaj fascinaj sunsubiroj en la eŭropa okcidento.

A TOXA

De Cambados al O Grove estas eta distanco. Kaj de O Grove, kie certe oni povas manĝi la polpon plej bonguste kondimentitan el la tuta marbordo, oni trairas ponton ĝis la insulo A Toxa. Kun la insulo Arousa, Cortegada kaj Sálvora, la insulo A Toxa animas kaj nuancas tion, kio sen ili estus monotona likva ebenaĵo.

En A Toxa estas fame konata la banloko kun sia luksa hotelo. Tie, la civilizacio plej postulema kaj eĉ la parfumo-industrio sukcesis establi sin ne detruante la virgan belecon de la naturo.

A LANZADA

La ŝoseo nin daŭre kondukas al la granda kaj soleca sablejo de A Lanzada, transpasante la terurajn kolerojn de la Atlantiko, lumigate de la lastaj lumoj de okcidento. En A Lanzada, kiu iam inspiris poetojn kaj kantistojn, restas la ruinoj de lumturo laŭdire samtempa kiel Turo de Herkulo en A Coruña. Danke al ĵusa elfosado, oni malkovris tie tre interesan nekropolon kun antropoidaj sepultejoj. La pejzaĝo estas ampleksa, kun panoramo, plena de vicleco.

COMBARRO

La ŝoseo transpasas la duoninsulon Salnes, preskaŭ je ties ekstremaĵo, kaj ĝi kondukas, jam ĉe la bordo de la enfluejo de Pontevedra, al Sanxenxo, kie troviĝas granda strando, riĉabundaj pejzaĝoj de pinaroj, bonegaj krustaco-establejoj kaj belaj palacoj nobelaj.

Poste, ĉe la sama bordo de la enfluejo, staras la urbeto Combarro. En ĝi ŝtono kaj kalko, en perfekta kunmeto, atingas neatenditajn efektojn donantajn unikan ĉarmon. Balustradoj, porĉoj, balkonoj kaj loĝioj prezentiĝas akorde kun vigla baroka stilo, el la plej aŭtoktona, spontanea popola baroko.

Kroman elementon de singulara povo dekoracia havigas al la urbeto la graciaj grenejoj (= hórreos), troviĝantaj sur la bordo mem de la maro. Malmultfoje la popola arto atingis tiajn nuancojn de bongusta intuicio. Tiu mara kaj kampara urbeto, kunodoro de pino, de krustacoj kaj de algoj, allogas per nerezistebla ĉarmo.

POIO

La vidado al la enfluejo de Pontevedra, kiun oni ĝuas laŭlonge de la ŝoseo kuŝanta surborde mem de la maro, fariĝas tre plaĉa ĉarmo, kaj ĝia efiko estas mildiga kaj trankviliga, same kiel tiuj de Arousa kaj Vigo. Ili estas pejzaĝoj mildaj kaj amindaj, en kiuj pulsas profunda vivoĝojo. Ili estas teroj de vino kaj kantoj, de sata voluptemo.

46a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

VIGO de la 15a ĝis la 20a de julio

KONGRESEJO

Centro Cultural de la Caja de Ahorros Municipal de Vigo. Strato, Policarpo Sanz, 13

RESTADEJO

San Francisco de Asís, strato Llorente 22, Telf. 423148.

CEFTEMO DE LA KONGRESO

ESPERANTO KAJ LA INTERNACIA JARO DE LA PACO

KONGRESPROGRAMO

MARDON, 15 an

10,00 h.. Disdonado de dokumentoj

18,00 h.. Interkona vespero. Urba vizito.

MERKREDON 16 an

10,00 h.. Kunsido de la HEF-estraro kun delegitoj de E-Asocioj.
(Salono Rafael Herrero)

12,00 h.. Inauguro de la 46a H.K.E. (Salono Zamenhof). Salutparolado de la prezidanto de la L.K.K., de la HEF-prezidanto kaj salutoj de la reprezentantoj kaj delegitoj.

Malfermo de la kongreso fare de la registara reprezentanto.

Festparolado, s-ro Xesús Alonso Montero.

17,00 h.. Artaj kaj Sciencaj Horoj. (Salono Petro Nuez)

18,00 h. Malfermo de la Libroservo de HEF.

19,00 h. Fakaj kunvenoj. HEJS, IFEF, ILEI. (Salono Salvador Oliván)

JAUDON 17 an

10,00 h. Fakaj kunvenoj. Tutmonde, Bahai, Junaj Verkistoj, Vegetaranoj ktp. (Salono Salvador Oliván).

12,00 h. Artaj kaj Sciencaj Horoj. (Salono Petro Nuez)

16,00 h. Folkloro Festo, vizito Grove, Toxa, Sanxenxo k.a.

VENDREDON 18 an

10,00 h. Laborkunsido pri la Centjara Datreveno de Esperanto, Esperanto-Kongresoj kaj Esperanto-Renkontiĝoj en Hispanio. Novaj Libroj. Laborplano por la jaro 1987. Prezentado de novaj E-verkoj. SFEROJ-4, Astura verko, k.a. (Salono Emilio Gastón)

12,00 h. Prelego en Esperanto, s-ro Antonio Alonso Núñez pri. "Nova baldaŭa revolucio. Informatiko en la hejmo".

17,00 h. Ekzamenoj. Kapabla kaj Instruista Esperantisto. (Salono Petro Nuez)

18,00 h. Elementa Esperanto-Kurso. (Salono Rafael Herrero).

SABATON 19 an

11,00 h. Kunsido de la HEF-estraro kun delegitoj de E-Asocioj. Tagordo. Jara raporto. Financa informo, Tagordo de la Generala Kunveno de HEF. Laborplano por la jaro 1987. (Salono Emilio Gastón)

13,00 h. Oficiala akcepto de la urbaj aŭtoritatoj

17,00 h. GENERALA KUNVENO DE H.E.F. (Salono Zamenhof)

DIMANĈON 20an

10,00 h. Tuttaga ekskurso al la "CIUDAD DEPORTIVA del Círculo Mercantil. Bankedo. PREMIO Klara Silberník. FERMO DE LA KONGRESO.

PONTE DE RANDE

Ni iras al Vigo tra la ponto de Rande. Tie ni povas admiri ĝian arkitekturan majstroverkon, de kie eblas ĝui la fonon de la enfluejo ĝis la insuloj Cíes, kun rigardo al unu flanko. Jetante rigardon al alia flanko, ni povas observi la samnoman rodon, kaj ĉe la fono la insulon San Simón, kiu estis lazareto dum multe da tempo, kaj kiu nuntempe estas iom nezorgata.

Denove en Vigo, kun ĝia granda trafika movado

Tradukis. VELUS



Avenuo kaj ĝardenoj apud Naŭtika Klubo.

VIGO, JULIO 1986a

En la jaro 1972a nia urbo jam estiĝis aktiva centro de grava evento kultura. la Hispana Kongreso de Esperanto, kiu ĉi-jare ripetiĝas en Vigo kun-alproksimiĝi la iluzio kaj la espero alproksimigi al novaj konkludoj kiuj, se ili eblas, universaligu pli lingvon kiu havas kiel fundamentan bazon la planeda konscienco.

Oni multe parolis pri la bezono malfermi landlimojn, por ke homoj manpremu sin antaŭ la maljustaĵoj kiuj okazas sur nia planedo. La esperantistoj estas personoj kiuj batalas favore de tiuj idealoj, oferante komunan lingvon por ĉiuj civitanoj de la mondo, superante tiel la unuan probleman. la lingvo.

Vigo estas grava urbo por foiroj kaj kongresoj en Galegio. La viganoj dankegas decidojn de kiuj konfidas pri la gastemeco de nia urbo por okazigi iliajn profesiajn kunvenojn en Vigo.

De la 15a ĝis la 20a de julio okazos tie ĉi la 46a Hispana Kongreso de Esperanto, kunvenigante en nia urbo gravajn esplorantojn pri tiu lingvo. Viroj kaj virinoj interesigitaj pri la nuntempa efektiveco de esperantismo kaj gijaj venontaj projektoj.

Mi bonvenigas ĉiuj gepartoprenantojn, konfidante ke vi portu agrablan memoron de via restado en nia urbo.

La Urbestro
Manoel Soto Ferreiro

IOM DA HISTORIO

Ĉiuokaze ni memorigas la kreinton de Esperanto, kaj kiel liaj sekvantoj ni memoras, ke en la jaro 1887 d-ro Zamenhof publikigis tiun lingvon. Personoj el diversaj de la mondo salutas tiun planitan lingvon kun la espero, ke ĝi reciproke interkomprenigu la loĝantojn de aliaj nacioj aŭ landoj, kaj frate unuigu ilin favore al la paco, tiel dezirata de ĉiuj bonvolemaj kaj sentimentalaj personoj, forgesigante fratmortigajn angorojn, kiuj faras, ke la homo estu lupo por alia homo.

Galegio ne povis foresti de tiu novaĵo, kaj en la jaro 1905 oni konis Esperanton en nia lando. Kiel indikis profesoro Alonso Montero, granda admiranto de tiu lingvo, la esperantistoj havas klaran sencon, malfermitan kaj fratecan, kiu karakterizas nin en kiuj ajn tempo kaj loko, kaj ankaŭ multaj el ni havas iom da galega emocio malfacile forgesebla. Tio estas vero, kara profesoro Alonso.

Esti esperantisto, kaj koni kaj disvastigi tiun lingvon ne estas maleblaĵo por ke ni forgesu la aliajn lingvojn, kiujn ni povas koni kaj lerni. Kontraŭe, ni bone komprenas la influon de la naskiĝlingvo en la homoj, kaj pro tio ni deziras atingi la interkompreniĝon pere de komuna lingvo, sen malestimo por tiu, kiun ni konis je la naskigo. Pro tio, Esperanto faras la galeganojn tre galegistoj, kaj la alilingvanojn, amantojn de sia propra naskiĝlingvo.

Laŭ nia historio, en Galegio, en 1905 jam estis personoj, kiuj praktikis kaj instruis la lingvon, kiun kreis Zamenhof, konkrete en la urbo La Coruña. Estis la fratoj Monteagudo, precipe Manuel, antaŭ nelonge mortinta tre maljuna, 94 jara. Sekvis kreante historion de Esperanto en Galegio, lau liaj de ni konataj aktivajoj, Santiago Carro, kiu klopodis prozelitisme en la jaro 1910 en la Universitato de Santiago de Compostela kaj en diversaj lokoj de Galegio dank'al siaj grandaj filologiaj studoj. Tiu homo estis admirata kaj tre aplaŭdata, kie ajn li iris instrui pri Esperanto, tiel sukcese, ke ĉi tie en Vigo li faris serion da prelegoj en la Societo "La Oliva", kiuj entuziasmigis la aŭdantaron, kaj oni lin nomumis honora membro de tiu societo.

El Ferrol, en la jaro 1922, instruis klasojn de Esperanto la kuracisto s-ro Antonio Porta, la plej entuziasma el la entuziasmuloj.

En 1928 en la urbeto La Graña (municipio El Ferrol) Francisco Lledó, scianta Esperanton, fondis la Grupon "Paco kaj Kulturo", en okazo de la ŝipbazo tie starigita. Li revoluciigis la tutan kvartalon per sia feliĉa Esperanto kaj tiel li troigis, ke anstataŭ "el zapatero" kaj "el herrero" oni diris la suiston kaj la forĝiston.

Ekde tiu momento, Ferrol estis la vera disvastiganto de la lingvo, kaj en la tuta urbo estis klasoj de Esperanto.

Eksplodis la tiel nomata "Movimiento", kaj konsekvence tuta nia aboro ruiniĝis, eĉ okazis personaj persekutoj, pro la opinio, ke Esperanto estas internacia kaj ĉi tie oni luktas por liberigi de la internaciaj hordoj nian patrujon.

Pasis tempo, kaj pro motivoj, kiujn neniam mi komprenis, la afero kvietiĝis kaj oni komencis fari kongresojn. La unua, okazinta en Galegio, estis organizita de Antonio Alonso Nuñez en Pontevedra en la jaro 1960 kun sama granda sukceso de partoprenantoj kaj de organizo. Ekde tiu kongreso Vigo kaj la viganaj esperantistoj komencis organizi la Vigan Esperantistan Grupon "Paco kaj Amo", kaj ĝis nun ni plu luktas kaj luktos ĝis la tago kiam la homaro estos unu sama familio, laŭ nia rekomendo.

Post la Hispana Kongreso de Esperanto okazinta en Alicante en la jaro 1971, Vigo surpriziĝis pro la alokazigo de la 32a Hispana Kongreso de Esperanto. Kiel vi ĉiuj scias, tiu havis plenan sukceson dank'al "Círculo Mercantil e Industrial" de nia urbo, kiu tute sin oferdonis favorante ĝin, kaj pro tio ni devas esti dankemaj al la laŭdinda s-ro Camilo Veiga Prego, kiu ĉiam estos memorata pro sia meritinda kunlaborado, tiel same persona kiel socia, en la esperantistaj kunvenoj, kiuj okazas tra Hispanio.

Sekve, Ferrol ankaŭ okazigis sian Hispanan Kongreson de Esperanto, kiu tiel same estis sukcesego, spite la forpason de multaj kaj bonaj esperantistoj.

En Santiago ni havas la profesoron Antonio Alonso Nuñez, kiu, kiel filologo, faras elstaran laboron inter la lernantoj de la universitato. Li estas homo kun tiom da lingvistika kapableco, ke mi kredas gin nesuperebla.

Hodiaŭ en Vigo ni troviĝas kiel knaboj ekuzantaj novajn ŝuojn, kaj ni tiel ĝojas pro la dezirego, kiu karakterizas la esperatistojn, esperante, ke tiu tuta entuziasmo fariĝu realaĵo, ĉar ni deziras vidi la alvenon al niaj hejmoj de tiom da esperantistoj ne malpli entuziasmaj kaj plenaj de amo al tiu agado, tiel sopirata de la homaro, por ke, pere de ĝi, ni vidus mondon, kie oni ne konos la vorton malamo, kie la amo regu super ĉiaj antaŭjuĝoj kaj diferencoj inter la homoj, kie jes, superregu la frateca ĉirkaŭbrako sen distingo pri rasoj, kredoj, kaj aliaj bagateloj, kiuj tiom da doloro okazigas al la Homaro, por ke la nomo milito malaperu for de la vortaroj de ĉiuj lingvoj.

Alvenos tago kiam la homo, neforgesante sian patrinan lingvon, entuziasme akceptos tiun kreaĵon de d-ro Esperanto, kiu tiel profitigos la homaron.

Mi ne parolas nek diskutas pri la perfekteco de la lingvo, kion mi certigas estas, ke se ĝi alportas tion, kion bezonegas la popoloj, mi ĝin konsideras panaceo por la homaro.

Mi esperas, ke la kongreso estu tio, kion ni bezonas, por vidi premiita tiun laboron, kiun nur agnoskas tiuj, kiuj sin ofertas kaj strebas por ĝia triumfo.

Julio Bueno Cortes.

ESPERANTO EN LA FILATELO

Hispanio ĝis nun emisiis meniun memorigan poŝtmarkon pri Esperanto, kiel faris aliaj multaj naciojn, tamen estis multaj la poŝtstampoj de esperanta temo, kiujn ni havis en Hispanio. La unuaj, aperis en la jaroj 1934 kaj 1936, kiuj komencis gravan kolekton.

Por la disvastigo, tiel same de Esperanto, kiel de ĝia filatelo, estis lancopinto la laboro de Hispana Instituto de Esperanto, kiu estis la unua ento, kiu eldonis kartojn kun represo de poŝtstampoj de la tiama des pli bona kolekto de la temo, fare de s-ro Evaristo Gil Pallares, forpasinta antaŭ ne pli multe ol unu-jaro, grava filatela specialisto kaj esperantisto, kiu kune kun s-ro Antono Moreno Medrano, ankaŭ esperantisto, kaj ankaŭ forpasinta, heredigis al ni sian emon al la temo kaj al la propra lingvo Esperanto.

Ni konas neniun alian rulpoŝtstampilon pri Esperanto, nek ec iun pli pri aliaj temo, ke estu skribita en lingvo ne parolata en nia patrujo.

Pri la du poŝtstampoj, antaŭe cititaj. tiu unua estas de Valencio, kaj laŭ nia scio, ĝi funkciis en julio kaj aŭgusto de 1934. Tiu rulo memorigis la 14an Kongreson de SAT. Laborista Internacia Esperanto-Kunveno, kiu okazis de la tagoj tria ĝis la oka de aŭgusto.

La dua rulo estas des pli interesa, laŭ ĝia ecaro. Gi estas alvoko por la 18a Kataluna Esperanto-Kongreso, kiu okazis en Manresa (Barcelono) dum la tagoj 31a de majo ĝis 2a de junio de 1936. La poŝtstampilo funkciis, des pli bone dirita, ŝajnas, ke ĝi tion faris dum la monato majo. Rimarkante la daton kaj la poŝton, kiun Manresa povis estigi kaj ricevi, kaj la eventoj, kiujn kelkaj sekvis, pripensigas la specialistojn pri ĝia malmulta disvastigado kaj, sekve, pri ĝia malabundeco. Pri tiu poŝtstampilo estas kurioza cirkonstanco. Tiel, ke ĝi estis propetita kun malmulta anticipo, ne estis sufiĉa tempo por ŝendi unu pretigitan en Madrido, kaj kun antaŭa permeso de la Ĝenerala Poŝta Direktado estis pretigita gumbendo kun legaĵo, kiun oni surmetis al normala rulo, kaj pri tio ĝi diferencas de datbobeno kaj de bendo kun legaĵo. La unika ekzemplero, kiun ni konas, portas tiun rulon, sur ĝia reverso, kiel dorsskribaĵo de alveno de oficiala koverto kun stampo de Navarces (Barcelono), pro tio nenia dubo povas esti pri ĝia autentikeco.

Ni konas neniun alian rulpoŝtstampilon pri Esperanto, nek eĉ iun pli pri aliaj temo, ke estu skribita en lingvo ne parolata en nia patrujo.

Aliaj du poŝtkartoj estis tiuj eldonitaj en 1962 kaj 1969, kiuj hodiaŭ estas maloftaĵoj, kvankam ne tiel kompareblaj kun tiuj rulpoŝtstampoj, antaŭe menciitaj.

Kune kun la okazaĵoj, kiuj estigis la poŝtstampilojn, oni posedas en nia lando la respektivajn vinjetojn, kiuj, kvankam neestante erojn de pura filatelo, tamen estas kiel komplemento de la poŝt-stampiloj, kiuj estis liverataj de la hispana Poŝto ekde la unuaj rulstampiloj.

Krom la postaj rulaj stampiloj kaj specialaj, en kelkaj esperantistaj kongresoj oni uzis, kune kun ili aŭ pro ne dispono de ili, kelkajn memorigajn gumstampilojn, kiuj pro sia malmulta disvastiĝo estas maloftaj kunfilatelaj aĵoj, kiuj estas simplaj, sed interesaj komplementoj de la kolektoj.

J. Campderrós
A.H.P.F.N.

LISTO DE LA LLIGINIAJ KONGRESANOJ ĜIS LA MOMENTO DE LA EKPRESADO

N.º	Allginto	Urbo-lando
1	Herminia Gil Alvarez	Zaragoza
2	Josefina Girona de Aragón	Barcelona
3	Salvador Aragay Galbany	Barcelona
4	Teresa Massana Rafols	Barcelona
5	Luis María Hernández Ysal	Barcelona
6	Julio Bueno Cortes	Vigo
7	Josefina Fernández López	Vigo
8	Antonia Galbany Cusido	Calella
9	J. Antonio Cabezos Martínez	Cartagena
10	Enrique Arnau Prosper	Cheste-Valencia
11	Francisco Manzanera Tarín	Cheste-Valencia
12	Ramón Gimenez Felú	Barcelona
13	Juan Coll de Gimenez	Barcelona
14	Plácida Sotillo Córdoba	Santurce
15	Rafaela Urueña Alvarez	Valladolid
16	Luis Hernández García	Valladolid
17	Frederiko Alberich Jofre	Barcelona
18	Jose M.ª González Aboin	Madrid
19	Avigail Mesulan	Tel-Aviv-Israel
20	Francisco Zaragoza Ruiz	Callosa de Segura
21	Josette Braem de Zaragoza	Callosa de Segura
22	Francisco Sánchez Antón	Alicante
23	Rafael Díaz Morilla	Buenos Aires
24	Ricardo M. García Tarín	Cheste-Valencia
25	Juan Navareño Fernández	Madrid
26	Manuel López Serna	Alicante
27	Concha Hernández Ballester	Alicante
28	Manuel López Hernández	Alicante
29	Concha López Hernández	Alicante
30	Alvaro Mellado López	Alicante
31	Ezequiel Mellado López	Alicante
32	Zaida Mellado López	Alicante
33	Jose M.ª Bernabeu Franco	Callosa de Segura
34	Dolores Egea Estan	Callosa de Segura
35	C. Inmaculada Bernabeu Egea	Callosa de Segura
36	Augusto Casquero de la Cruz	Madrid
37	María García Martín	Valladolid
38	Carmen Conde Labajo	Valladolid
39	"FRATECO" Esperanta Societo	Zaragoza
40	Jaime Canoa González	Vigo
41	M.ª Esther Vez Barrero	Cheste-Valencia
42	Carmen Arnau Prosper	Cheste-Valencia
43	Manuel Rodrigo Ballester	Cheste-Valencia
44	Gian Carlo Fighiera	Madrid

45	Magda Planas Llaurado	San Feliu de Llobregat
46	Jozefo Miranda Calvo	San Feliu de Llobregat
47	Pascual Gil Figuer	Barcelona
48	Paqui Corrales Guerrero	Málaga
49	Julio Herrero Segura	Málaga
50	Luis S. de Otaola y Faón	Bilbao
51	J. Carlos Quintas Montero	Vigo
52	Grupo Esperantista	Alicante
53	Pilar Montenegro Sanjurjo	Vigo
54	Grupo Esperantista Vigues "Paco kaj Amo"	Vigo
55	Celestino Pousa Veloso	Vigo
56	Manuel Lojo Martínez	Vigo
57	Francisco Martínez Iglesias	Vigo
58	María Vila Más	Barcelona
59	Jozefo Palmero Perez	Tenerife
60	Javier Pousa Veloso	Vigo
61	Angelina Pousa Hernández	Vigo
62	Conchiña Pereira Lamelas	Vigo
63	Catuxa Bueno Betancourt	Vigo
64	M.ª Esther Quintela Rey	Vigo
65	Faustina Martínez Guillen	Vilanova i Geltru
66	Josefa Martínez Guillen	Barcelona
67	Pío Moa Banga	Vigo
68	Charo Ortega Torres	Hospitalet
69	Isabel Otero Doural	Vigo
70	Laura Vilán Dasilva	Pontevedra
71	Concha Vilán Dasilva	Pontevedra
72	Juan Fernández Borrell	Perpignan-Francia
73	Fernando Costa	Matosinhos-Portugal
74	Ruth Alves de Medeiros	Matosinhos-Portugal
75	Luis Serrano Perez	Sabadell
76	Vicente Hernández Llusera	Sabadell
77	Josep Ivern Más	Barcelona
78	Josep Climent Grañana	Barcelona
79	M.ª Dolores Roca Castesón	Roldan-Murcia
80	Vicente Molins Reig	Callosa de Segura-Alicante
81	Jozefo Colome Claverol	Mollet-Barcelona
82	Joaquina Viñallonga Gali	Mollet-Barcelona
83	Fernando de la Puente Solsona	Zaragoza
84	Xose Lourenzo Vidal	Arcade-Pontevedra
85	Matias Morell Cortes	Cheste-Valencia
86	Humildad Ternero Valero	Cheste-Valencia
87	Ricardo Manzanera Tarín	Cheste-Valencia
88	Pilar Guillen Mañez	Cheste-Valencia
89	Miguel Martínez Marín	Zaragoza
90	María Teresa Carnicer	Zaragoza
91	Astura Esperanto-Asocio	Gijón
92	Santiago Mulas Gallego	Gijón
93	M.ª Paz Rocas Iglesias	Gijón

94	Susana M. ^a Mulas Roces	Gijón
95	Julio Argüelles García <i>v. Mayte (mujer)</i>	Gijón
96	Manuel Fernández Suárez	Gijón
97	Adonis González Meana	Gijón
98	Angelita Vega Rodríguez	Gijón
99	Gervasio Colunga Fernández	Gijón
100	Faustino Castaño Vallina	Gijón
101	M. ^a del Pilar Perez Presa	Vigo
102	María Grau Magraner	Valencia
103	Francisco Ramirez Baldoví	Valencia
104	Angel Mañero González	Valencia
105	Dolores Teixido Melero	Terrassa-Barcelona
106	Giordano Moya Escayola	Terrassa-Barcelona
107	Paula Iglesias Ruíz	Vigo
108	M. ^a Elvira Álvarez Iglesias	Vigo
109	Valentín Rdguez. Alvarez-Neira	Vigo
110	Jose M. ^a Rodríguez Hernández	Córdoba
111	Antonio Almeida	Portugal
112	Olga Almeida	Portugal
113	Marti Guerrero Cots	Hospitalet
114	Rosalía Desirre Rahona	Hospitalet
115	Gerardo Flores Martín	Madrid
116	Antonia García Montemayor	Madrid
117	María Galiana Flores	Madrid
118	M. ^a Teresa Asencio Galiana	Madrid
119	Jose Luis Sánchez Vázquez	Pontevedra
120	Eduardo Larrouy López	Bilbao
121	Carmen Norabuena de Larrouy	Bilbao
122	Rolando Coelho	Oporto-Portugal
123	Ramón Martí Sanz	Sevilla
124	Rosa Blay Calatayud	Sevilla
125	Rafael Ruiz Criado	Badalona
126	Angeles Martínez Lievana	Badalona
127	Fernando Salvador Hernández	Valencia
128	Domingo Domenech Savall	Valencia
129	Teresa Almela Alert	Valencia
130	Elias Domenech Savall	Valencia
131	M. ^a Isabel Beút Miralles	Valencia
132	Juan Antonio Gimenez Gcia.	Valencia
133	Alicia Azanar Lahoz	Zaragoza
134	Josep Cervelló Garí	Terrassa-Barcelona
135	Fermina Rodríguez García	Vigo
136	Anabel Marques Lamas	Ferrol
137	Merchi Yañez Mata	Vigo
138	Jacinto Urueña Antón, J.	Valladolid
139	Carmen Alvarez López	Valladolid
140	Felicidad Martínez Giralda	Valladolid
141	Francisco Perez Parente	Vigo
142	Sonia Quintas Perez	Vigo

143	Angeles Perez Alonso	Vigo
144	Eva Alcoy Souteyrant	Barcelona
145	Edelmira Campdelacren Llagortera	Barcelona
146	Francisca Yruegas del Río	Madrid
147	Elvira Valentín de la Paz	Barcelona
148	Francisco Cabezas Jimenez	Alicante
149	Antonio Alonso Nuñez	Santiago de Compostela
150	Concepción Menlle Fernández	Santiago de Compostela
151	Encarnación López Arce	Barcelona
152	Antonio Sánchez San Pedro	Barcelona
153	Edzino de Joaquín Bielsa	Zaragoza
154	Joaquín Bielsa	Zaragoza
155	Eugenio Sorrosal Vicente	Barcelona
156	Esposa de Eugenio Sorrosal	Barcelona
157	Jordi Ivern Cacho	Barcelona
158	María Julia Cacho de Ivern	Barcelona
159	Montserrat Ivern Cacho	Barcelona
160	María del Mar Ivern Cacho	Barcelona
161	Trinitat García Cobacho	Barcelona
162	Jaime Fernández Varela	Vigo
163	Rosa Costa Bastero	Vigo
164	Martín Aguado Jerez	Gerona
165	M.ª del Carmen Mosquera Quinteiro	Santiago de Compostela
166	Rafael D. Morilla	Buenos Aires (Argentina)
167	Sdad. Esperantista de Tenerife	La Laguna
168	Juan Pedro Liceranzu Ortega	Bilbao
169	Feliciana Oliván Guiu	Francia
170	David Alcoy Souteyrant	Barcelona
171	A.M. Correia Coimbra	Lisboa (Portugal)
172	María del Carmen Señor Fernández	Valladolid
173	Begoña Moa Rodríguez	Vigo
174	Isabel Moa Rodríguez	Vigo
175	Hugh P. Reid	Skotlando (Gran Bretaña)
176	Manuel Manteca López	Málaga
177	Jesusa Alvarez Blanco	Vigo
178	Alejandro Romasanta Rodríguez	Vigo
179	Cristina Rey Cancela	Ferrol
180	Susana Rey Cancela	Ferrol
181	Julio Jose Juanes Sainz	Algorta (Vizcaya)
182	Arcisela Carrión Gamis	Valencia
183	Ismael García Carrión	Valencia
184	Alberto Elobat Bosch	Valencia
185	Rafael Peris Solaz	Valencia
186	Amparo Luján Beltrán	Valencia
187	Amparo Vinet Luján	Valencia
188	Jesús Bermúdez Tellado	Becerreá (Lugo)
189	Jose García Alvarez	Aboño (Asturias)
190	Angel Figuerola Auque	Madrid
191	Marcelina Paloma de Figuerola	Madrid
192	Peregrina González Gardón	Madrid
193	Delia M.ª Martínez García	Navia (Asturias)

HISPANAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

- 1a.— Jaro 1920a en BARCELONA.
 - 2a.— Jaro 1921a en ZARAGOZA.
 - 3a.— Jaro 1923a en VALENCIA.
 - 4a.— Jaro 1924a en BILBAO.
 - 5a.— Jaro 1925a en CORDOBA.
 - 6a.— Jaro 1926a en MADRID.
 - 7a.— Jaro 1928a en SEVILLA.
 - 8a.— Jaro 1929a en OVIEDO.
 - 9a.— Jaro 1930a en MADRID.
 - 10a.— Jaro 1933a en SANTANDER.
 - 11a.— Jaro 1936a en BARCELONA.
 - 12a.— Jaro 1951a en TARRASA.
 - 13a.— Jaro 1952a en VALENCIA.
 - 14a.— Jaro 1953a en BILBAO.
 - 15a.— Jaro 1954a en ZARAGOZA.
 - 16a.— Jaro 1955a en GIJON.
 - 17a.— Jaro 1956a en BARCELONA.
 - 18a.— Jaro 1957a en MADRID.
 - 19a.— Jaro 1958a en CASTELLON DE LA PLANA.
 - 20a.— Jaro 1959a en MALAGA.
 - 21a.— Jaro 1960a en PONTEVEDRA.
 - 22a.— Jaro 1961a en PALMA DE MALLORCA.
 - 23a.— Jaro 1962a en VALLADOLID.
 - 24a.— Jaro 1963a en BARCELONA.
 - 25a.— Jaro 1964a en VALENCIA.
 - 26a.— Jaro 1965a en PALENCIA.
 - 27a.— Jaro 1966a en BILBAO.
 - 28a.— Jaro 1967a en ZARAGOZA.
 - 29a.— Jaro 1969a en LA LAGUNA.
 - 30a.— Jaro 1970a en MIERES.
 - 31a.— Jaro 1971a en ALICANTE.
 - 32a.— Jaro 1972a en VIGO.
 - 33a.— Jaro 1973a en MADRID.
 - 34a.— Jaro 1974a en VALLADOLID.
 - 35a.— Jaro 1975a en LERIDA.
 - 36a.— Jaro 1976a en EL FERROL.
 - 37a.— Jaro 1977a en SABADELL.
 - 38a.— Jaro 1978a en LEON.
 - 39a.— Jaro 1979a en GIJON.
 - 40a.— Jaro 1980a en MADRID.
 - 41a.— Jaro 1981a en MURCIA.
 - 42a.— Jaro 1982a en MALAGA.
 - 43a.— Jaro 1983a en ZARAGOZA.
 - 44a.— Jaro 1984a en SEVILLA.
 - 45a.— Jaro 1985a en CARTAGENA.
 - 46a.— Jaro 1986a en VIGO.
-
-

MEMORNOTOJ

A large, empty rectangular box with a thin black border, occupying most of the page below the title. It is intended for the main body of the memorandum.



0910